



Mi nomiĝas Karina Oliveira, mi estas ĵus-diplomita lingvistikino, kiu loĝas en San-Paŭlo, Brazilo. Nuntempe mi magistriĝas pri lingvistiko, studante la silaban strukturon de Esperanto kaj tion per kiuj fonologiaj procezoj novaj vortoj eniras en la lingvon. Resume, do, studi Esperanton estas mia ĉefa tasko nuntempe (profesie).

Dum mia infanaĝo mi loĝis en eta urbo, nomata “Biritiba Mirim” (Biriĉiba Mirim), kiu estas tri horoj for de San-Paŭlo. En 2009, kiam mi estis 18-jaraĝa, mi translokiĝis al la granda ĉefurbo de la ŝtato, ĉar mi estis aprobita en la ekzameno por studi en la Universitato de San-Paŭlo, la plej grava en tuta Brazilo. La elektita kurso estis Ĝenerala Lingvistiko kaj Filologio pri la portugala lingvo. La kurso daŭris kvin jarojn kaj duono (jes, estas longa kurso, kaj tre malfacila...) sed finfine en 2014 mi diplomiĝas.

Dum tiuj kvin jaroj mi laboris en du eldonejoj, kiel reviziistino de tekstoj, kaj en ĝenerala produktado de libroj. Mi faris ankaŭ sciencajn esplorojn pri la malfacilaĵoj kiujn afrikanoj (precipe junuloj el Gvineo Bisaŭa) havas por lerni la portugalan, parolatan en Brazilo (ĉar ĝi estas tre malsama ol tiu parolata en Portugalio). Dum la lasta jaro de la kurso (2013-2014) mi faris esplorojn pri la influo de la variantoj de la portugala al la parolado de Esperanto.

Ekde la jaro 2012 mi partoprenas en la laboro de la estraro de EASP (Esperanto-Asocio de San-Paŭlo), kiel propaganda direktorino. Pro tio, mi intense partoprenas la organizadon de la renkontiĝoj de San-Paŭlo (renkontiĝo de la esperantistoj de la urbo kaj la ŝtata kongreso), kaj daŭrigas mian partoprenon en la aferoj de la asocio dum la jaro.

Ekde 2012, mi disvastigas Esperanton ankaŭ en mia universitato. Mi renkontis kelkajn barojn, kompreneble, kiel mokado de pluraj personoj, kaj la diro de kelkaj universitataj instruistoj ke “Esperanto estas mortinta lingvo“, aŭ ke “Esperanto ne taŭgas por scienca esploro”. Malgraŭ tio, mi sukcesis enkonduki oficialan kurson de esperanto en la universitato, kune kun la aliaj lingvoj, kiuj jam estis instruitaj tie.

Mi laboris ankaŭ por junulara rekontiĝo, kiu okazis en la Bienlernejo Bona Espero julie 2013. Informoj pri ĝi videblas ĉe <http://vintraarangxo.wordpress.com/>.

Mi laboris kun profesorino pri Fonetiko kaj Fonologio kiel helpanto en la lecionoj kaj helpante la novajn lernantojn.

Finfine, kaj eble plej grave, mi partoprenas la instruistan trejnadon, kiu okazas ene de la programo de la trijara kurso ĉe Poznano, por la grupo 2011-2014. Do, mi jam konas la universitaton de Poznań, ĉar mi jam estis tie dufoje por la unuaj du sesioj de la trejnado.

Mia partopreno en la instruista trejnado estas ebla danke al mona fonduso kiun BEJO (Brazila Esperanta Junulara Organizo) kreis, per kiu la organizo pagas miajn vojaĝbiletojn. Por la trijara postdiplomiĝo, ili daŭre helpas min laŭ la eblecoj de la fonduso, sed oni ne multe donacas, kaj eble BEJO ne povos helpi min en ĉiuj vojaĝoj.

Krom laboro kaj studo, mi ŝategas ludi volejbalon, kaj partoprenas la teamon de la universitato, kaj mi ŝatas ankaŭ triki (ĉiujn koltukojn, kiujn mi surhavas mi mem faris =D). Mi ŝatas ankaŭ bicikli kaj promenadi.

Sincere dirite, mi ne ŝatas vivi en granda urbo kaj preferas vivi en la kamparo, sed estas en San-Paŭlo kie mi trovis lokon kaj oportunon por iĝi tio kio mi volas esti: sciencistino, esploristino pri fonetiko kaj fonologio (precipe rilate al Esperanto) kaj instruistino pri tiuj fakoj. Post mia magistriĝo kaj doktoriĝo, mi provos esti universitata instruistino, kaj tiam oficiale instrui ankaŭ esperanton en la universitato en kiu mi laboros. La trijara kurso en Poznano estas grava por mi ankaŭ pro tio.

Pro tio mi volas sekvi la kurson en Poznano. Dum la kvin jaroj de mia diplomiĝo, mi aŭdis el diversaj universitataj instruistoj, ke ne valorus la penon studi science Esperanton, kaj mi volas montri ke ĝi fakte estas studinda paj parolinda! Nur la fakto ke mia projekto por studi Esperanton estis aprobita por la departemento de lingvistiko jam estas venko por mi, sed mi volas pli da venkoj. Mi volas ke oni respektu Esperanton, kaj ke ĝi havu valoron antaŭ la lingvistoj.

Ĉar mi iris al Poznano jam du fojojn, tio helpis min montri ke Esperanto funkcias, ĉar ĉiuj demandas min ĉu mi bone scias la polan por sekvi kurson en Pollando. Kiam mi diras, ke la kurso estas tute en Esperanto, la personoj apenaŭ kredas, kaj tio ekpensis ilin pri la vera ebleco de la ekzisto de Esperanto.

La unuopaj vojaĝoj de San-Paŭlo al Poznano kostas, pli malpli (dependas de kiam oni aĉetas la vojaĝbiletojn) 900 eŭrojn. Mi ja devos vojaĝi tien 7 fojojn. Mi estus malĝoja pro financoj mistrafi tiun eblon.